

Duonjarcento de Sennacieca Asocio Tutmonda, 4-a parto

Claude Gacond, 407-a radioprelego, 1971.07.28 & 31

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi someron Sennacieca Asocio Tutmonda festas duonjarcenton de ekzistado. Ni partoprenas tiun jubileadon dediĉante kelkajn radio-elsendojn al la priskribo de la ĉefaj etapoj de la historio de SAT.

A.- La dek-unuaj jaroj de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu estis fondita en 1921 dum la dektria Universala Kongreso de Esperanto en Prago, estis maltrankviligitaj de la alfrontado de politikaj luktoj.

Cl.- La tiam laboristaro estis dividita inter tri ĉefaj tendencoj : la soveta komunismo, la anarkiismo kaj la demokrata socialismo. Eŭgeno Lanti alvokis la esperantistojn, kiuj aliĝis al SAT, celadi superpartiecon kaj veran sennaciismon.

A.- Sed multaj esperantistoj ne povis sekvi la saĝajn alvokojn de Lanti. Ili volis uzi Sennaciecan Asocion Tutmondan por propagandi la proprajn politikajn kaj eĉ naciajn vidpunktojn.

Cl.- La ĉefa kontraŭulo de Eŭgeno Lanti estis la soveta komunisto Ernesto Drezen. Tiu gvidanto de la rusaj esperantistoj estis sufiĉe kompleksa personeco, pri kiu mankas informoj. Aŭtoro de *Historio de la mondlingvo* li ludis kulturen rolon. Li posedis ampleksan esperantlingvan bibliotekon, kiun Eŭgeno Lanti admiris okaze de vizito al Kremlo.

A.- Politike Ernesto Drezen ne povis toleri aliajn ismojn, ol la sovetan komunismon. Kaj en la sennaciismo li vidis danĝeran herezaĵon absolute detruendan. Se li aliĝis al SAT kaj ludis en ĝi ĉefrolon dum pluraj jaroj, tio estis nur en la celo disvastigi pere de ĝi la sovetismon.

Cl.- Ernesto Drezen uzos plej diversajn lukto-rimedojn por provi varbi Sennaciecan Asocion Tutmondan al la komunismo. Unue, dum la SAT-kongresoj, li gvidis akrajn atakojn kontraŭ la tendencoj, kiujn li malamis : kontraŭ anarkiismo, kontraŭ demokrata socialismo kaj kontraŭ superpartieco. Al la sennaciismo li preferas la tradician internaciismon, kiu permesas enkadrigi la laboristojn en naciaj organizaĵoj.

A.- Estas nun malfacile imagi la akrecon de la tiamaj luktoj, kiuj dividis la SAT-anaron. Ankaŭ estas malfacile imagi la blindan simpatian, kiu profitis al la rusa komunismo. Estas nur en la londona kongreso en 1930, ke aŭdiĝis la unuaj malfavoraj kritikoj pri la reĝimo en Sovetio. Tiam ortodoksaj komunistoj rebatis firme kun indigno, ke laŭdojn oni povas permesi, sed ke mallaŭdojn oni ne toleru.

Cl.- Ernesto Drezen unue luktis kontraŭ la morala influo de Eŭgeno Lanti per intervenoj dum la SAT-kongresoj. En 1928, dum la 8-a Kongreso de SAT, kiun partoprenis en Gotenburgo, Svedio, pli ol 500 kongresanoj, Ernesto Drezen esprimis sian koleron kontraŭ la artikoloj de Eŭgeno Lanti, kiuj aperis en la organo *Sennaciulo* sub la titolo *Inter Ni*. Tiuj spritaj, ironiaj kaj foje akre kritikemaj tekstoj vundis en Drezen la ortodoksulon. Ili alportis vidpunktojn, kiujn la soveta komunisto ne povis pli longe toleri. Tiam *Sennaciulo* havis pli ol mil abonantojn en Sovetio mem. Tial por Ernesto Drezen estis absolute necese trovi rimedon por ĉu silentigi Eŭgenon Lanti kaj fari de *Sennaciulo* komunistan organon, ĉu malpermesi la eniron de tiu SAT-organo en Sovetion.

A.- El la intervenoj de Ernesto Drezen en Gotenburgo ni citu tiun minacon :

Cl.- « *Ni povas diri tute klare : Ni en Sovetio havas diktaturon laboristan... Eble povas veni momento, kiam ni estos devigitaj foriri el SAT, aŭ el SAT foriros ĉiuj alitendencanoj.* »

A.- Ni ne povas trovi pli netan kontraŭstaron al la alvokoj al superpartieco de Eŭgeno Lanti.

Cl.- En la 8-a kongreso de SAT Ernesto Drezen sentis, ke li ne povos lukti kontraŭ la influo de Lanti per demokrataj rimedoj. Ekde tiam li pretigos la cenzuradon de la SAT-organoj en Sovetio. Kiel altranga funkciulo li rapide alvenos al tute kontentigaj rezultoj.

A.- La saman jaron li eldonis ruslingvan propagandilon, kie la nomo de SAT malaperas profite al tute nova titolo : Internacia Laborista Unuiĝo de Unueca Fronto. La SAT-direkcio respondas, al tiu unua paŝo al skismo, per longa deklaro.

Cl.- En 1929 la 9-a SAT-kongreso okazas en Lejpcigo, Germanio. Ĝin partoprenas 662 kongresanoj el 22 landoj. El Sovetio ricevis vizon por ĝin viziti nur la du gvidantoj de la soveta esperantistaro : Drezen kaj Demidjuk. Furiozaj atakoj kontraŭ la SAT-gvidantoj kaj la persono de Lanti malheligis la kunsidojn de tiu kongreso. Laŭ Drezen la SAT-gvidantoj faris tri krimojn. Unue ili faris politikan krimon propagandante la sennaciismon. Due ili faris taktikan krimon publikigante artikolojn, en kiuj estas kritikoj kontraŭ la soveta komunismo. Trie ili faris personan krimon donante al Lanti la permeson daŭre esprimi siajn herezaĵojn en la rubriko *Inter Ni*.

A.- Tiam multaj kongresanoj ekstaris por defendi la estraron de SAT, por defendi la rajton al superpartieco kaj la sennaciismon, kiuj estas la esenco de SAT.

Cl.- Drezen tiam uzas novan taktikon. Ruinigi Sennaciecan Asocion Tutmondan. Li influas la sovetan registaron, por ke la kotizoj kaj la mono ŝuldata al SAT por libroj ne plu povu forlasi Moskvon. Li scias, ke tio estos giganta bato por SAT, ĉar temas pri pli ol centmil tiamaj francaj frankoj.

A.- Tuj la SAT-gvidantoj aperigas alarm-artikolon, kiu estas titolita *Rifo sur la Vojo* kaj monoklekto estas malfermata kun la devizo : *Por eviti la Rifon*. La vera SAT-anaro malavare subtenos sian ŝatatan movadon, kaj la taktiko de Drezen fiaskos.

Cl.- La saman jaron 1930 en la 10-a kongreso, kiu grupigas en Londono 340 SAT-anojn el 16 landoj, la kongresanoj estas dividitaj en du malamikaj kampoj. Tamen la skismo estas evitita. Sed en aŭtuno, unu monaton post la SAT-kongreso, oni estas informata pri la kreado de Sovetlanda Esperanto-Unio.

A.- En oktobro tiu SEU eldonas, sub la titolo *Internaciisto*, gazeton, kiu estas plena de insultoj kaj kalumnioj kontraŭ la gvidantoj de SAT. Kaj ekde tiam la rusaj esperantistoj estos devigataj nur aboni tiun organon.

Cl.- Kelkajn jarojn poste tiu gazeto malaperos. Kaj kun ĝi malaperos la oficiala esperanto-vivo en Sovetio. Jen kiel finiĝis unu el la malhelaj momentoj en la esperanto-vivo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-